VALENCIA LUNO

BULTENO DE LA VALENCIA ESPERANTO-GRUPO

GRAN VIA FERNANDO EL CATOLICO, 45, 3.ª - ☎ 326 96 16 - VALENCIA - 8

Nº 9 - FEBRUARO 1984

OKULOJ

Tra bluaj lagoj, flatas vin la mondo,
ĉar sur ĉi akvoj ĉiam enemantaj,
la mondaj bildoj, enkarceriĝantaj
restadas per sureirisa ondo.

Kontraste vian el obskur´ vizaĝon,
dumtage, viaj okulegoj, sunoj
aspektas, kaj dumnokte, brilaj sunoj
dorlote forigantaj de mi l´ saĝon.

Okuloj viaj, bruna, la koloron
posedas, kiu en ilian enon
sinkigis mian elkaptitan koron.

Posedas vi, mistera, la mienon,
rigardon rava, kaj dolĉĉarma koron,
igantajn ĉiam for de mi la penon.

S. RICARTE

(Oktobro 1982)

ĜENERALA ASEMBLEO DE LA VALENCIA ESPERANTO-GRUPO

kiam: 23-an februaro 1984, 7-an vespere.
kie: Sidejo de la Grupo, G. V. Fernando el Católico, 45, 3ª.

TAGORDO:

1.- Legado kaj aprobo de la antaŭa akto.
2.- Elekto de novaj estraranoj.
3.- Ĉefaj agoj de la pasinta jaro kaj celoj por la nuna.
4.- Bilanco 1983 kaj budĝeto 1984.
5.- Petoj kaj demandoj.

La ĝenerala asembleo estas la plej grava ago de ĉiu esperantisto. Tie oni decidos la sorton de Esperanto en Valencio.
Nepre ĉiuj devas kunveni.

Normoj por la elekto de novaj estraranoj:

Leĝe, la nuna estraro devas daŭri dum alia jaro, sed praktike ni bezonas helpon, ĉefe por administracia kaj sekretaria laboro, kaj ankaŭ ni revas havi delegitojn de la esperantaj fakoj: fervojistoj, filatelistoj, turismo, IKUE, SAT, MEM, k.t.p.
Tial oni alvokas al ĉiuj kiuj povas roli en tia senco, aŭ konas iun kiu povus tion fari, prezentu al si mem aŭ al li, kiel kandidaton por tio, oni devos prezenti al la nuna estraro, plej malfrue duonhoro antaŭ la komenco de la ĝenerala asembleo, bileton kun kompleta nomo kaj, laŭeble, taskon kiun oni povus plenumi.

Celoj por la jaro 1984

La estraro proponis kiel kolektivan celon por tiu ĉi jaro: PLIGRANDIGI KAJ PLIBONIGI LA ANOJN EL NIA GRUPO.
Tio povus esti direktita en du sencoj:

1.- Starigi novajn rilatojn "movado-lernantoj" per tri ĉefaj agoj:
   - gravigi la disdonon de diplomoj per ĉeesto de la esperantistaro kaj solenaĵo.

- atenti la komencon de la kurso.
- intermiksi paroladon pri la movado meze de la kursoj.

2.- Zorgi la malnovajn esperantistojn kaj ekslernantojn per:
- sendi leterojn al ili.
- eldoni pluan Valencian Lunon por sendi al ili.
- fari esperantajn tagojn sabate, kun amuza parto kaj multnombra invito.

SOCIETA VIVO de MAGAMO

NOVAJ GEEDZOJ

La pasintan tagon 7-an Aŭgusto 1983, okazis en la vilaĝo Quart de Poblet (Valencia), geedziĝo de nia societano Francisco Abad Moya kaj Marisa.

Ni deziras ke ili estu feliĉaj kaj manĝu perdikojn.

NOVA ESPERANTISTO

La pasintan vendredon 20-an Januaro, en la Hospitalo Gómez Ulla en Madrido, naskiĝis la unua filo de nia societano kaj prezidanto de MEL, Aŭgusto Casquero de la Cruz.

Ni deziras ke la gepatroj estu feliĉaj pro la alveno de la bela fileto AŬGUSTO.

POLINO DEZIRAS KORESPONDI

Kun sinjoro aŭ sinjorino de nia Grupo, ŝi havas 48 jarojn, komencanto pri nia lingvo. Ŝi jam partoprenis en la lasta UK de Budapeŝto.

MARIA CZAJKOWSKA, 44-100 GLIWICE
Str. Ul. Konarskiego 11/1 POLSKA

L E R N E J A   P A Ĝ O

Statistiko de la lernokursoj

Kara samideano, legu kaj meditu la jenajn numerojn.

	1982	1983	Tute
Gvidantoj	4	3	
Gelernantoj	68	42	110
Lernantoj	41	26	67
Lernantinoj	27	16	43
Aĝo			
Antaŭ 18 jaroj	14	11	25
de 18 ĝis 25	31	16	47
" 26 " 35	16	8	24
" 36 " 50	3	5	8
" 51 k.t.p.	4	2	6
Studa nivelo			
Elementala	3	3	6
Baza	15	12	27
Meza	21	4	25
Profesia	6	5	11
Teknika	4	2	6
Mezuniversitata	9	6	15
Universitata	10	10	20
Kalendaro			
1ª kvaronjaro	23	21	44
2ª kvaronjaro	15	3	18
4ª kvaronjaro	18	7	25
Sabatoj	12	3	15
Propagandilo			
Amikoj kaj familianoj	21	18	39
Jurnaloj	27	9	36
Spektakla anoncaro "Cart. Turia"	3	2	5
Afiŝoj	13	4	17

Radio kaj TV	1	3	4
"Expo Jove"	--	2	2
Aliaj	3	3	6

KONKLUDOJ

- La plej granda ĉeestado estis lernantoj ĝis 35 jaroj dum la unua kvaronjaro.
- La plej bona propagando estis farita de amikoj kaj familianoj, do PROPAGANDU LA KURSOJN al viaj konatuloj.
- Petu afiŝojn en la Grupo kaj gluu ilin en via laborejo, lernejo, universitato, montrofenestroj ktp.
- La Grupo devos intensigi la propagandon en la ĵurnalojn.
- Pensu ni. Kial malpliiĝis la lernantoj? Kion vi povos fari?

Johano Antono

AKTUALAJ KURSOJ

Daŭrigas la elementalaj kursoj: Lundo, merkredo kaj vendredo, de 7 ĝis 8 kaj 8 ĝis 9, por komencantoj.

Konversacia kurso: Lundo kaj merkredo, de 7,30 ĝis 9, por grupanoj. Ĉu vi venos?

LA KONTRAŬO

En ŝuvendejo, sinjorino estas surprobante kelkajn ŝuojn, la ŝuvendanto proponas ŝin surprovi la du piedojn, ĉar, li diras:

- Ĉiuj ni havas unu piedon pli granda ol la alia.

Mi ne -respondas la sinjorino- mi havas unu piedon pli malgranda ol la alia.

VALENCIAJ TRADICIOJ

LES FALLES. LA FESTO DE LA FAJRO

La vorto falla (faljo), kiu devenas de la latina "FACULA" (kiu signifas torĉon). Oni pritraktas valencian mozarabismon, kiu jam enviciĝis inter la "Vocabulista in arabico" aŭ glosaro araba-latina, kunmetita de Rajmondo Martí, laŭ insistpetoj de la reĝo Jakobo Ia. Oni trovas ĝin dokumentita en la 16a ĉapitro de la Kroniko de la sama reĝo. En la senco de flambrulaĵo uzis ĝin Jakobo Roig ĉe la 2373a verso de "L'Espill" (La Spegulo) aŭ "Llibre de les dones" (Libro pri la virinoj).

La deveno de la nuntempaj "falles" (faljoj) oni trovas en la gilda korporacio, kiu havis la malsamajn oficojn kaj profesiojn dum la privilegia epoko kaj specife ĉe la ĉarpentista korporacio, kiu datumas el la XIIIa jarcento. Antaŭlonge estis kutimo, ke la labortagoj inter aŭtuno kaj vintro, tio estas, ekde sankta Mikaelo (29-an de septembro) ĝis sankta Jozefo (19-an de marto) oni laboris dum la horoj de la tagekfiniĝo ĉe la lumo de oleolampoj pendigitaj sur krucforma stango nomita valencilingve "ESTAI" aŭ "PAROT". Kiam alvenis la antaŭtago de sankta Jozefo, patrono de la korporacio, la metilernantoj kaj knabetoj ekbruligis flambrulaĵon aŭ faljon faritan el lignaj restaĵoj, mebloj kaj malnovaj sentaŭgaĵoj, stariginte ĉion tion sur la parot-o, kiel limtempo ke estis finitaj la mallumaj laborhoroj. La satira esenco de la metiistoj, enlokigitaj en tio kio tiam oni nomis "partides del Carme" (distriktoj de Karmena) kiu estas nun la kvartalo pli tipa el la urbo, vestigis kaj piedvestis la parot-on, ne mankis pli, la genio, la humuro kaj la pensita kaj farita aliigis la parot-on je grupo da "ninots" (pupegoj), karikatura figuro, kiu estas la ĉefa rolulo sur la faljo. Laŭ ĉi tiu teorio ke la faljoj naskiĝis kiel konkludo pro la purigado en la ĉarpentejoj la antaŭtago de sankta Jozefo, ĉi tiuj ne povus esti antaŭaj al la XVIa jarcento, tiel ke ne estis ĝis finaĵoj de ĉi tiu jarcento kiam komencis ĝeneraliĝi la religia fervoro pri sankta Jozefo.

Oni povas konsideri ke la deveno estas multe pli antikva, kiel havi paganan antaŭaĵon. Laŭ multa kredebleco la faljoj devenas el la flambrulaĵoj kiujn oni ekbruligis dum la saturnaj festoj, kiujn oni celebris en la sezonoŝanĝoj. La faljo estas civiliza flambrulaĵo. La unuaj faljoj konsistis je kvar framoj el pentrita tolo kun sola "ninot" (pupego) sur la podio; poste aperis scenoj kun du aŭ tri pupfiguroj kaj ĉe la paso de la tempo oni aldonis aliajn elementojn ke ĝia argumento bezonis ĝis alveni al la nunaj faljoj.

La faljoj estis kaj estas elstare popularaj; ili naskiĝis inter la klasoj plej modestaj, siaj konstruantoj restis sub la anonimo. Kvar ŝercemuloj oni kunvenis en la butiko, la barbejo aŭ la kafejo, helpitaj de ĉarpentisto kaj facila multsatira versofaranto. La knabetoj oni prenis sur sin la amasigado de malnovaj sentaŭgaĵoj per mato, kiun ili trenis tra la stratoj dum ili kantis:

"Per ahí hi ha una estoreta velleta
EN TIE ESTAS MATETO MALÑOVETA

per a la falla de sant Josep el tio Pep
POR LA FALJO DE SANKTA JOZEF` LA ONKLO JOCJ`

mes que siga la tapadora del comú número ú."
ANKORAŬ KE ESTU LA KOVRILO DE LA NECESEJ`
NUMERO UNU.

La starigado de la faljoj oni faris je fruaj horoj en la ektagiĝo la 18-an de marto, do la festo oni celebris tiam la antaŭtagon de sankta Jozefo kaj oni forbruligis ilin ĉirkaŭe je la oka vespere en la sama tago. La temo estis sekreto kaj la surprizo aperis sur la strato aŭ placo samtempe kiel la sunlumo. Ĝia klarigado povis legi ĝin sur la fasadoj de la domoj plej proksimaj al la faljo. En tiuj tempoj la faljoj elmontris al mokado de pli ol kvar genajbaroj. La unuaj temoj estis konfuzaĵo inter la najbararo. Poste venis la eternaj socialaj kaj politikaj problemoj ĉiuspecaj: la prezo pri la porvivaĵoj, la luprezoj, la lumprezo, la eventoj pli popularaj en ĉiu jaro, k. t. p.

Vincento Blasco Ibáñez en sia verko "Arroz y tartana" (Rizo kaj kaleŝo) skribis belegan litera-

turan priskribon de la faljoj kaj ĝia medio.

En la nuntempo la faljoj, kiuj oni starigas pli ol kvarcent, estas la festo pli populara en Valencio. La falja semajno (12-an ĝis 19-an de marto) atingas reputacion inter la turismaj festoj, kiujn oni celebras ĉiujare.

Tradukis: Fco. Aliaga

ETATO DE NIA LIBROSERVO

JAROJ	1980	1981	1982	1983
AĈETADO		63.445.-	149.609.-	167.262.-
VENDADO		58.689.-	207.106.-	147.855.-
PROFITOJ		18.676.-	55.062.-	43.984.-
STOKO	19.364.-	42.796.-	85.361.-	148.752.-

MANUEL GARGALLO MONFORTE
LIBROSERVANTO



ESPERANTO EN RADIO

En Valencio ni aŭskultis, bone, klare, forte kaj sen bruo, la sekvontajn elsendojn:

Ĉiutage kaj hispana horo
21,00 - 21,30 Pekino, 9965 kHz. Informoj. Parolado.
22,30 - 22,55 Varsovio, 7285 kHz. E-Movado.

Dimanĉe
20,05 - 20,15 Vatikano, 6210 kHz. Religia.

Lunde
19 - 19,10 Berno, 3985 kHz. Informoj.
21,30 - 21,40 Berno, 3985 kHz. Ripeto de la antaŭa.

Marde
22,10 - 22,30 Keli, Svedio 17790: nur la unua mardo de ĉiu monato. Iomete brue.

Ĵaŭde
Berno: same kiel lunde.

Sabate
21 - 21,20 Romo, 9710, 7275. Parolado

Ni aŭskultas ilin per ricevilo "Grundig 1400 Satellit" kune kun interna anteno de 1.44 m.

Ĉu vi, altestimata leganto, aŭskultis ilin per via ricevilo?

Ĉu ankaŭ aliajn esperantajn radioelsendoj? Skribu al ni ĉiujn informojn pri radio. Ni dankos vin.

JOHANO

Patrino diras al infano:
-Vi devas esti bona por iri al la ĉielo, kaj se vi estas malbona, vi iros al la infero.
La infano demandas tiam:
-Kaj por iri cirkon, kion mi devas fari?

KLARA

ĈIU, ĈIU

(Ĉilia melodio)

Teksto kaj muziko de Nicanor Molinare



Koregan dankon mi direktas al s-ro Sergio Docal, el Vaŝintono, ĉar en Budapeŝto li donacis al mi 380! kantojn kun muziknotoj kaj Esperantaj tekstoj, samtempe tradukitaj, jen hispane, jen angle, germane, portugale aŭ itale. Inter ili, "ĈIU, ĈIU" gaja kaj amuza kanzono por la uzado kiel instruhelpilo

Félix Navarro

FESTO DE LA TAGO DE ZAMENHOF

La pasintan 18-an Decembro, alian jaron pli, nia Grupo festis la datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, kiu estas ĉi-jare la 124-a.

Agrabla surprizo estis la pli granda partoprenantaro en la aktoj, kio vigligis la feston.

Je la 12-a matene, kiel anoncite, estis metita sur la memorplato kiu troviĝas en la strato D-ro Zamenhof, kaj memore al li, laŭra krono.

Poste, je la dua kaj duono postagmeze, ĉe la Restoracio Ortiz de la apuda vilaĝo Mislata, ni bankedis pli ol kvindek personoj. La bankedo disvolviĝis inter bongustaj pladoj kaj amika etoso.

Je la fino de la bankedo paroladetis nia kara prezidanto s-ro Pascual Pont, kiu sekve prezentis la eksterlandajn geesperantistojn, kiuj kun ni bankedis. Ili estis: s-ino Lilia Konstantinova, bulgara esperantistino edziniĝinta kun nia samideano Miguel Saballs Poves, el Aldaia; s-ro Adacio Vieira, konsulo de Portugalio en nia urbo; s-ro Dennis Keefe usona esperantisto kiu loĝas antaŭ pli ol unu jaro en nia urbo; kaj fine, la belga juna esperantisto Hans Stinders, kiu pasigas kelkajn monatojn ĉe "Esperanto-Oazo" de Gandía.

Kiel fino de la festeno, estis prezentita en la sama restoracio serio da lumbildoj pri la pasinta Universala Esperanto-Kongreso, okazinta en Budapest (Hungario). Ĝi estis aranĝita de Dennis Keefe kaj Manolo Gargallo, kaj prezentita de la unua.

Finis la aktoj, dezirante ĉiuj ariĝi en baldaŭa okazo kun tiel bona etoso.

Carles N. Moya i Seguí

Edita: Grupo Esperanto de Valencia
Dep.Legal V-1683-1983 Redactor: José Pérez Sempere

KRUCENIGMO Nº 9 de ALIA-GO



HORIZONTALE: 1.-Mola kaj tre movebla muskola organo. 2.-Rilata al angloj aŭ al Anglujo. 3.-Genro de unujaraj, plurjaraj herboj kaj arbustoj. (Rad.) Alia, pli malnova nomo de nitrogeno. 4.-(Inv.) Rilata al difinita kvanto da medikamento. Ceremonia vira vesto de la antikvaj romanoj. 5.-Subjunkcio. (Inv.) Plurala pronomo de la unua persono. 6.-Opo de tri aferoj aŭ personoj. (Adv.) Plej zorge gardi kaj flegi. 7.-Adverbo signifanta: multe da fojoj unu post alia. (Inv.) Difinita parto de spaco. 8.-Moviĝu, por atingi iun aŭ ion. 9.-Genro de graminacoj (akuzative).

VERTIKALE: 1.-Blanka, dolĉa likvaĵo, produktata de specialaj glandoj. 2.-(Inv.) Prilabori lignon, metalon, oston k.t.p. 3.-Speco de haroj, distingiĝantaj per sia fajna, krispa kaj skvamsurfaca strukturo. (Rad.) Ano de la ĉefgento loĝanta en Italio. 4.-(Rad.) Pozitiva elektrodo en pilo. (Inv.) Grasa likvaĵo el animala, vegetaĵa aŭ minerala origino. 5.-Literoj de negi. (Inv.) Singulara virseksa pronomo. 6.-(Rad.) Prezentanta nenian elstaraĵon sur sia supraĵo. Muskola organo, kiu pumpas la sangon. 7.-Izola loko, verda kaj kvazaŭinsula en la dezerto. (Inv.) La malantaŭa parto de la kolo. 8.-Subtena, nervure elstara arko, diagonale streĉita sub volbo, por ĝin fortikigi. 9.-(Rad.) Internacia unuo de volumeno, uzata por mezuri la internan kapaciton de ŝipo.

SOLVO DE LA ANTAŬA KRUCENIGMO

HORIZONTALE: 1.-Ola. Por. 2.-Bide. Oida. 3.-Etuloj. Ot. 4.-Alaŭdoj. 5.-Tĉ. En. 6.-Mi-en-mia. 7.-Pa. Teismo. 8.-Enui. Okon. 9.-Rol. Oro.
VERTIKALE: 1.-Obe. Per. 2.-Lita. Mano. 3.-Adulti. Ul. 4.-Elaĉeti. 5.-Oŭ. Ne. 6.-Ojdemio. 7.-Pi. Onisko. 8.-Odoj. Amor. 9.-Rat. Ono.

GRUPO ESPERANTO DE VALENCIA
Gran Vía Fernando el Católico, 45 - 3.ª
Tel. (96) 326 96 16
VALENCIA-8

Valencio, la 30ª januaro 1984

Karaj gesamideanoj,

Kiel prezidanto de la grupo, mi devas konfesi al vi ion tre grava: la grupo funkcias malbone. La kialoj estas pluraj, sed eble la ĉefa estas la forlaso pro nepraj profesiaj devoj, de la tre aktiva laboro farita lastatempe de niaj amikoj Moya, Diago, León kaj Ricarte. Certe, la problemo estas nedaŭra, ĉar neniu el ili malgrandigas sian esperantistecon, sed intertempe...

Kontraŭe, la universala movado travivas, laŭ mia opinio, la plej interesan epokon el sia historio. Pruvoj...: la sukceso de la lasta Universala Kongreso en Budapeŝto... La oficialigo de Esperanto en Internacia Asocio de Kibernetiko... sed eble... la plej grava... Cu vi aŭdis ke Usono forlasos Unesko? Cu vi scias ke la kialo estas la Nova Komunika Ordo adoptita de Unesko? Kaj en la Nova Komunika Ordo Esperanto estas laborante tre aktive.

Nia kara Tero ĉiu tago estas pli malgranda, kaj la homoj, ĉiuj homoj bezonas kaj aspiras vivi kune kaj pace. Vi bone scias ke lastatempe en Valencio mem, multenombriĝas la movadoj, asocioj, manifestacioj por la paco, la unueco, la universala sento de la homaro.

Kial ni ne atingas montri al ili ke tia unueco nur estas teorio se ne komencas havante veran ilon por interparoli kaj interkompreniĝi la homoj, ĉiuj la homoj? Kiel montri ke se ĉia lingvo profunde influas la subkonscion de la homo, la fakto de paroli kaj uzi veran internacian lingvon estas nepra kondiĉo por daŭra kaj profunda internacia konscio?

Nia tasko estas tre granda, grava, urĝa kaj bezonas la strebadon, la penojn, la klopodojn de ni ĉiuj. Niaj kapabloj estas malsimilaj. Iu taŭgas por paroli, alia por skribi, tiu por organizi, tiu ĉi por diskuti kaj konvinki. Iu havas sufiĉe da libera tempo, aliaj estas tre okupataj. Iu konas tre bone la gramatikon, alia havas gravajn amikojn; tiu ĉi estas fervojisto, povas vojaĝi senpage kaj ĉeesti en pluraj kunsidoj, sed mi estas certa, ke se la tuta valencia esperantistaro laboras laŭ sia ebleco, ni povos ege progresigi nian movadon.

Mi atendas vin en la Asembleo. Venu pretaj por diskuti kiel vi volas la movadon kaj kiel oni povas tion atingi, kion oni devas ŝanĝi kaj kion oni devas konservi. Estas la laboro de la tuta jaro kion oni devas tie aranĝi.

Gis la baldaŭa revido

Paskal Pont
Prezidanto de la Grupo